

kunbogepatroj (kio signifas kungeulojn en la bopatra stato). Eble iuj konsideras tiujn esprimojn komplikaj, tamen estas mia opinio pli racia kaj ekonomia afero enkapigi kelkajn kunmetitajn vortojn ol longe klarigadadi la gradon de iu boparenceco. Oni akuzas nian lingvon, ke la vortoj kaj esprimoj estas longaj. Jen metodo plikurtigi ilin. Se la etnaj lingvoj severe diferencigas la vortojn ekz. onklino-boonklino, praonklino-bopraonklino, ni devas krei la esperantajn variantojn por pruvi la egalrajtecon de esperanto.

### Resumo

Verŝajne el inter la legantoj multaj pensas, ke tiu kurta verketo estas nur vana teoriomado, ke tiujn vortojn nur la genealogoj bezonas kaj pensas kvazau interkrampe, ke nur genealogoj rajtas enkonduki novajn terminojn. Estas fakto, ke nuntempe la dugeneraciaj familianoj vivas en paneldomoj, ili havas t.n. panelrilatojn. La vilaĝaj infanoj havas pli favoran stacion, ili povas renkonti pli ofte la parencojn. Mia konvinko estas, ke la homoj denove loĝas en grandaj familiaj domoj, se la ekonomiaj cirkonstancoj tion ebligas, La homa vivo feliĉe plilongiĝas, la gejunuloj frue geedziĝas, do samtempe kunvivas kvar generacioj: la pranepoj ankoraŭ konas siajn praavojn. La pli aĝa generacio konservas la rilatojn kun la maljunaj parencoj (laŭ aĝa kaj generacia nivelo), do ni devas instrui niajn gefilojn kaj genepojn kiel decas alparoli la parencojn kaj familianojn.

Mi aldonas, ke la ekzemplo pravas, ke ĉi tiu strebo ne estas vana. La junularo en nia lando alparolis ĉiun "onklo" au "onklino", sendepende de aĝo kaj parenca au neparenca rilato, do nia lingvo malriĉiĝas. Mi kutimis atentigi niajn apudulojn pri la ĝusta alparolo, kaj ankaŭ ili demandas, kiu estas mia parenca rilato al ili. Do kvankam mi ne estas juna, oni ne nomas min onklo, nek nacilingve nek esperante, oni uzas la prezentitajn vortojn. Se mi sukcesis haltigi primitiviĝon en mia familio, ni devas provi ĝin ankaŭ en la esperantaj kaj naciaj socioj.

Kiel literaturo la aŭtoro uzis nur PIV-on.

Adreso de la aŭtoro: D-ro Balazs Szemök  
Pozsonyi ut 2  
H 2737 Ceglédbercel.

"Lexicon silvestre, Prima pars" kun novaj vortradikoj

Karl-Hermann SIMON, Ingwart ULLRICH, Horst WECKWERTH  
Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a. Eberswalde

### 1. Antaŭparolo

Ekde 1981 ekzistas internacia grupo de forstfakaj esperantistoj, kiuj kunagadas kaj kiuj nomiĝas ekde la jaro 1986 "Internacia Forstista Rondo Esperantlingva" (IFRE). La intenco de la grupanoj apliki kaj evoluigi Esperanton en la forsta fako gvidis al la komuna laboro pri multlingva faka vortaro. La rezulto estis la prezentado de provexemplero de "Lexicon silvestre, Prima pars"/1/ okaze de la centjara jubileokongreso de IUFRO (Internacia Asocio de Forstfakaj Esplorinstitutoj) en Berlin/Eberswalde 1992. Tiun laboron la grupo intertempe daŭrigis per plivastigo de la nombro de prilaborataj lingvoj al 25, enmeto de korektad-proponoj kaj komenco por la elekto, klasifiko, sistemigo, difino kaj nomumo de la dua milo da nocioj. Ankaŭ kelkajn terminojn ni korektis. Ĉi tie ni raportos pri la novaj vortradikoj, kiujn ni proponas.

### 2. Pri la elekto de norm-terminoj

La terminologia scienco postulas por fakaj terminaroj, ke en unu lingvo ĉiu nocio estu nomata nur per unu termino kaj ĉiu termino reprezentu nur unu nocion /2/. Post aprobo per koncerna komisiono tiu ĉi termino estiĝos "norm-termino".

Tian ellaboradon de la forstfaka terminaro la aŭtoroj de "Lexicon silvestre" povas fari por Esperanto, ĉar IFRE reprezentas la forstistan esperantistaron. Por la aliaj lingvoj la kompetentaj organoj estas la opaj laborgrupoj de IUFRO kaj la koncernaj etnolingvaj fakgrupoj. Por la etnolingvoj ni nur povas kolekti la uzitajn terminojn po nocio.

Kadre de multlingva verko la elekto de konvenaj normterminoj estas ne tro malfacila por la aŭtoroj, ĉar ili povas apogi sin sur la stoko de la etnolingvaj terminoj. Sed ekzistas apartaĵoj de la forsta fako. La nombro de la ekzistantaj forstfakaj terminoj Esperant-lingvaj estas nur eta pro la relative malmultaj tiurilataj verkaĵoj. Ankaŭ la nombro de la internaciaj terminoj estas kompare al aliaj fakoj nur malgranda, ĉar la forstmastrumado estas tre maljuna, kaj multajn specifajn forstfakajn esprimojn oni konsideru etnaj-historiaj, kaj tial ili estas enradikiĝintaj en la lingvo de multaj popoloj.

Ĉe la preparo de la unua parto de "Lexicon silvestre" ni procedis tiamaniere, ke malgranda terminologia komisiono de IFRE kolektis kaj trarigardis kaj ordigis la Esperant-lingvajn proponojn kaj elektis la plej taŭgan po nocio, kiel propono de la komisiono por diskuto.

Rilate la proponon de novaj vortradikoj, la komisiono estis tre singarda kaj tial la nombro de novaj radikoj estas malgranda laŭ nia opinio. Sekve ni prezentas la novajn vortradikojn kun iliaj difinoj.

### 3. La novaj vortradikoj en "Lexikon silvestre, Prima pars"

La sekva listo de novaj vortradikoj entenas nur radikojn, kiujn ne enhavas PIV/3/ aŭ la listo de CHERPILLOD/4/.

bonited/i (tr). Pritaksi ion laŭ ĝia prestopovo, kvalifigado aŭ laŭ definita karakterizaĵo: ~i arbaron.

~o. Potenco, kvalifigado, prestokapablo.

~a. Adjektivo al ~o.

~ado. Ago de tiu, kiu ~as.

bork/o. Ekstera, ne plu viva ŝeltavolo de arbo. → kruda ŝelo sen~igi. Forigi ~on sen nudigo de la viva histo.

dendrokronologi/o. Scienco pri la aĝodatado de lignoprovaĵoj.

dendrometri/o. Teorio pri la mezurmetodoj ĉe starantaj kaj kuŝantaj arboj aŭ arbopartoj kaj ankaŭ arbaroj.

depudat/o. Naturaĵo, kiun ricevas rajtiganto sen aŭ kontraŭ eta pago.

eko-geografi/o. Scienco, kiu pritraktas la aspekton de la diversaj regionoj de la tero, speciale en rilato al vivajoj kaj iliaj medio.

~a. Rilata al ~o.

evapotranspir/i (ntr). Vaporigi kaj transpiri.

~o. ~ado. Ago de iu, io ~anta.

femel/i (tr). En neregula distribuo sur arbara areo depreni arbojn en grupeto- ĝis grupeto-dimensia amplekso.

~arbaro. Arbaro, kiun oni mastrumas ~ante.

~o. Ago de iu, kiu ~as.

~a. Rilata al ~o.

fornir/i (tr). Sur malnoblan lignon – pleje lignoplaston – surglui ~on el nobla ligno.

~o. Maldika ligna folio (de ĉ. 0.5 ĝis 8 mm diko), kiun oni deigis per ŝelado, tranĉado aŭ segado for de lignobloko.

rotaci-~o. ~o, produktata per ŝelado de rotacianta lignobloko.

tranĉ-~o. Forniro, produktata laŭfolie per rabotforma tranĉado-proceso.

habit/o 1 Ofica vestaĵo. 2 Ekstera aspekto, eksteraĵo.

arb o~. Eksteraĵo de arbo.

hajstr/o. Kelkjara arbido, havanta alton de pli ol 1,5 m.

hidromelioraci/o. Longefika plibonigo de fekundec-estigantaj ecoj de starejo por la vegetalara produktado fare de forigo de aŭ provizado per akvo.

intercepco/o. Dumtempa reteno de pluvo kaj neĝo fare de plantkovraĵo.

kleng/i (tr). Ekstrakti semojn el strobiloj de (pinglo)arboj per varmo kaj/aŭ mekanikaj rimedoj.

~ado. Ago de tiu, kiu ~as.

~ejo. Laborejo por la laŭfaka prilaborado de forstaj semoj.

laborologi/o. Scienco pri la aranĝo de laboroj, precipe konsiderante la homan laborpovon, celante optimalan kunefikon de laboranto, laborrimedo kaj laborobjekto.

litier/o. Defalaĵo de arbizaĵo, kiu – kiel la plej supra tavolo de la humokovraĵo – estas en la unua stadio de la malkombino.

lizimetr/o. Mezurinstalaĵo kun izolita grundbloko, kiu ebligas esplori la trasorbiĝan terakvon (kaj kalkuli la kvanton de evapotranspirita akvo).

mezotrofi/o. Modera riĉeco rilate nutrajn substancojn.

~a. Rilata al ~o.

modr/o. Arbara humo – ĉe mezotrofia supra grundo –, ĉe kiu la vegetaĵrestoj estas dispecigitaj kaj per grundobestoj transformitaj en fekaĵrestaĵojn ĉe modera miksaĵo kun la minerala grundo.

plent/i (tr). En neregula distribuo sur arbara areo depreni unuopajn arbojn aŭ arbogrup(et)ojn. Tiamaniere oni interligas flegadon, rikolton kaj junigadon en ~arbaro.

~arbaro. Arbaro, kiun oni mastrumas ~ante.

~o. Ago de iu, kiu plentis.

~a. Rilata al plento.

repelent/o. Rimedo por ŝirmi plantojn kontraŭ difektado fare de ĉasbestoj kaj paŝtiĝantaj brutoj aŭ ŝirmi ion kontraŭ insektoj.

silvikulturologi/o. Scienco de la fundamentoj pri kultivado de arboj en arbaro por produkti ekonomie krudmaterialojn, protektajn kaj socialajn preĝojn k.a..

starejologi/o. Scienco pri la dependeco de la kresko-kondiĉoj de la vegetaĵaro, precipe de grundo, klimato kaj reliefo.

ŝrenk/i (tr). Fari la ŝrenkon.

~o. La devio de la segildento-pintoj for de la ebena de la segilklingo.

timbr/o. Kolekta esprimo por ĉiuspeca krudligno, kiun oni povas prilabori kaj uzi, krom brulligno.

Ni aldonas ankoraŭ la vortradikon "kalamit", kiun ja CHERPILLOD registristis, sed en tute alia senco:

kalamit/o. (pp arbaro) Abundaj arbardifektoj, kaŭzitaĵoj de faktoroj biotaj kaj/aŭ abiotaj, kiuj sekvigas gravajn ekonomiajn kaj soci-bonfartigajn perdojn.

(Vidu CHERPILLOD/4/ por planto calamites)

#### 4. Perspektivo

Kompare kun la 1025 prilaboritaj nocioj de la unua parto de la leksikono, ŝajnas la nombro de 26 novaj vortradikoj relative modesta. La dua parto enhavas jam iom malpli oftajn nociojn kaj pli da specialaj nocioj el la forsta tekniko kaj tial la nombro de la necesaj novaj radikoj verŝajne relative plialtiĝos.

#### 5. Literaturo

/1/ Lexicon silvestre, Prima pars. Eberswalde-Finow 1992. Proverekzemplero. 431 p. (Kun helpo de FAME-fondaĵo, Stuttgart, Germanio)

- /2/ WERNER, J.: Terminologia kurso. Esperanto-Asocio. Roudnice n.L. 1983, 88 p.
- /3/ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, dua eldono, Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris 1977, 1303 p.
- /4/ CHERPILLOD, A.: Nepivaj vortoj, dua eldono, Eldono de aŭtoro, Courgenard, 1988, 182 p.

Adresoj de la aŭtoroj:

Förderverein "Lexicon silvestre" e.V.  
 Dr. Karl-Hermann Simon  
 c/o Fachhochschule Eberswalde  
 Bibliothek  
 Schicklerstr. 3-5  
 D - 16225 Eberswalde

**Fondaĵo Premioj Por Ĝustaj Vivrimedoj**

***Right Livelihood Award Foundation***

Porgazetara informo je la 12-a de oktobro 1994

"La premioj de la Fondaĵo Por Ĝustaj Vivrimedoj en 1994 emfazas la gravecon de la infanaro, spiritaj valoroj kaj indiĝenaj kulturoj.

Premiojn ricevas sveda aŭtorino de infanlibroj, niĝera aktivulo por homrajtoj kaj memhelpaj organizaĵoj en Hinda Unio kaj Trinidado."

**Astrid Lindgren**, sveda aŭtorino, gajnas en 1994 la **Honoran Premion**. Ŝiaj porinfanaj libroj, tradukitaj en 60 lingvojn, estas amataj en la tuta mondo. Ili enspiras la imagon kaj edifis la spiriton jam de multaj generacioj de infanoj kaj plenkreskuloj.

En la 1980aj jaroj Astrid Lindgren komencis kampanjon kontraŭ misuzo de bestoj, kio kondukis al leĝo, mondvaste rigardata kiel la plej progresinta, kiu limigas fabriktipan bestobredadon.

La jurio honoras la vivdaŭran dediĉon de Astrid Lindgren al la rajto de infano por kresko en amo kaj en respekto al ilia individueco. La premio honoras ŝian sindevigon al justeco, senperforteco kaj komprenado de minoritatoj kaj ŝian amon kaj respondecon al naturo.

**La Premion Fondaĵo Por Ĝustaj Vivrimedoj** pri 250000 USD estas en 1994 distribuita inter la ogolanda niĝerano Ken Saro-Wiwa kaj la organizo MOSOP kies prezidanto li estas, la hinda kuracisto H. Sudarsha kaj la organizo VGKK, kaj la trinidado organizo SERVOL.

Internacia Scienca Asocio Esperantista